### Internacia Junulara Kongreso 2013

La venonta IJK en la nordo de Israelo. Dum ni laboras pri la finaj detaloj, aliĝu al nia ŝatant-paĝo. Legu pli: https://www.facebook.com/pages/Internacia-Junulara-Kongreso-2013/361443420610312

### IJK 2014 en via lando!

Limdato plilongigita al la 31a de oktobro por kandidatiĝi kiel kongreslando de IJK 2014! Legu pli: http://www.tejo.org/organizu-kongreson

### La 37-a Malferma Tago de la Centra Oficejo, 27a novembro 2012, Rotterdam, Nederlando

La 37-a Malferma Tago de la Centra Oficejo estos unu el la lastaj aranĝoj de la festado de la 125-jariĝo de Esperanto. La ĉefpreleganto estos prof. Humphrey Tonkin, kiu parolos pri la temo "125 jaroj: Esperanto tiam kaj nun". Krome li traktos, sub la temo "Traduko kaj originalo en la Esperanto-literaturo", la nocion ke Esperanto-literaturo estas en si mem tradukita literaturo -- en la senco, ke ĉiu literatura verko en Esperanto estas iasence manifestiĝo de la kultura kaj lingva fono de la verkinto.

Estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. Aldone al specialaj ofertoj la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la libroservo , butikumi en la bazaro de esperantaĵoj kaj gajni premiojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo. Legu pli: https://www.facebook.com/events/468565676521636/ kaj http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=476#1

### FESTO 2012 iĝis la plej grava ĉi-jara muzika evento

FESTO 2012 iĝis la plej grava ĉi-jara muzika evento en Esperantujo kun koncertoj de Zhou-Mack Mafuila, “Espo Despo”, Gijom, “Dolĉamar” (jes, kun "ĉ"!), Jonny M, du lokaj grupoj kaj kun spektaklo de la Pariza trupo “Kvak”.

Legu pli detale en la riĉe ilustrita artikolo de Flo Martorell, aperinta en la oktobra kajero de La Ondo de Esperanto kaj en la novaĵretejo La Balta Ondo. http://sezonoj.ru/2012/09/festo/

### [Klaĉ-Kunveno Post Somera - KKPS 2012] La programo de la KKPS estas preta

*Malsukcesa elŝuto.*

### Ĉu vi ankoraŭ neniam partoprenis en Esperanto-kongreso?

Ĉu vi ŝatus partopreni la JES? Ekzistas fonduso kiu subtenas malriĉajn unuafojajn partoprenantojn. Kandidatiĝu nun! Kaj SENDU al ĉiuj komencantoj, kiujn vi konas! Legu pli: http://jes.pej.pl/2012/fonduso.php

### Vinilkosmo: Preparoj de la albumo « Okcitanio » de Patric

Kadre de la promeskampanjo de Vinilkosmo. Legu pli, vidu kaj aŭskultu ĉe http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/415898

### 46a ILEI-KONFERENCO en Herzberg am Harz (urboparto Sieber) 12-18. julio 2013

Dumviva lernado: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj

En 2013 – post konferenco en Azio kaj antaŭ verŝajna serio de konferencoj ekster Eŭropo – ILEI organizos sian 46-an konferencon en la Esperanto-urbo Herzberg am Harz. Ĝi okazos semajnon antaŭ UK kun postkonferenca vetureblo al Rejkjaviko, Islando. Legu pli: http://ilei.info

## Novaj fabeloj haveblas ĉe Kunlaboro

Grupo de esperantaj tradukistoj kaj bildistoj tre ĝentile sendis al ni belajn ilustritajn fabelojn por senkoste disdoni ilin sed la grupo petas anonimecon.

Jen la ligilo por senpaga elŝuto: http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/

Oni povas kopii kaj disdoni ĉi tiujn dosierojn sed senkoste kaj sen profita celo!

Portal Kunlaboro http://www.kunlaboro.pro.br

## Venontaj renkontiĝoj

44a Korea Kongreso de Esperanto, Hanmaeum Jayeon Hakgyo en Jangseong, Koreo, 27a kaj 28a de oktobro 2012 https://www.facebook.com/events/437603652941932/

Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj, Kastelo Greziljono, Francio, 27a de oktobro ĝis 3a de novembro, http://www.gresillon.org/autune

Klaĉ-Kunveno Post Somera - KKPS, Delft, Nederlando, 2a ĝis 4a de novembro 2012 https://www.facebook.com/events/256141727826605/ kaj http://klaĉkunveno2012.wikispaces.com/hejmo (atentu: c x estas ĝusta retadreso)

1a skolta rendevuo, Rosée, Namur, Belgio, 2a ĝis 4a de Novembro, http://verdajskoltoj.wordpress.com/

9-a Rata Rendevuo „Tra urbo kaj vilaĝo“ kun koncerto de "Kapriol", Hameln, Germanio, 3a kaj 4a de novembro 2012, http://www.esperanto.de/hameln

2-a BIERo, Žatec, Ĉeĥio, 9a ĝis la 11a de novembro 2012 http://mladez.esperanto.cz/?p=1087&lang=eo

KLERIGKURSO, STUDSESIO ĉe Germana Esperanto-Centro en Herzberg, Germanio, 14a ĝis 16a de decembro, http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=61311937

Eŭropa rendevuo de Stella, Stella-Plage, Nord-Pas-de-Calais, Francio, 17a de novembro 2012, http://esperanto.nord.online.fr/eo/stella/index.htm

29a IF, Dortmund, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013 http://www.internacia-festivalo.de

Novjara Renkontiĝo / NIS, Xanten, Germanio, 27a de decembro 2012 ĝis 3a de januaro 2013 http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#alighilo

31a Komuna Seminario 2012, "Takaonomori Wakuwaku Village” apud Monto Takao, en Urbo Hachioji en Tokio, Japanio, 28-30a de decembro 2012, https://sites.google.com/site/komunaseminario2012/esperanto

4-a Junulara E-Semajno, Naumburg, Germanio, 28a de decembro 2012 ĝis 4a de januaro 2013, http://www.facebook.com/junularaesemajno kaj http://www.jes.pej.pl

4-a NOVA - Novjara Aranĝo, Praia da Pipa, RN (Norda Riogrando), Brazilo, 3a de januaro ĝis 6a de januaro 2013, http://novjaraaranĝo.wordpress.com/ (atentu: g x estas ĝusta retadreso)

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu